

B I L E T O D E L A P R E Z I D A N T O .

Notre Association, notre bulletin.

La Ligue Française Catholique Espérantiste doit sa permanence à quelques membres dévoués autant que modestes. Cependant, elle conserve sa place et sa mission. Elle s'exprime par un bulletin de liaison dont les ressources sont limitées, et beaucoup parmi nos amis regrettent que ces quelques feuilles trimestrielles ne soient pas, par une présentation luxueuse, un beau papier, un contenu plus divers, l'instrument de propagande plus efficace qu'ils souhaitent.

Ce serait, bien sûr, le vœu des membres du Comité de Rédaction, qui font appel à toutes les suggestions, ainsi qu'aux concours autorisés et compétents, pour qu'une telle amélioration puisse prendre corps.

Il faudrait aussi des abonnés nouveaux, et ce n'est certainement pas le prix modique demandé chaque année qui est un obstacle. Aussi faisons-nous appel à nos membres de province pour qu'ils recrutent autour d'eux, s'entourent d'amis sympathisants, s'efforcent de les convaincre en les associant à une activité de contacts internationaux où l'utilisation de l'Espéranto à un but commun crée un lien dans une action concertée.

Notre dispersion rend les contacts entre nous exceptionnels: pourquoi ne pas chercher, dans notre ville ou notre région une personne qui accepterait de faire la liaison entre vous, et à l'occasion à correspondre avec les membres du Comité.

Il serait souhaitable que ces "Cercles", ces "Clubs", à l'exemple des villes jumelées, aient des rapports avec un ou plusieurs groupes étrangers, et les sujets d'information, d'échanges intellectuels ne manquent pas.

Nous avons à plusieurs reprises, exprimé le vœu qu'un prêtre accepte d'être le conseiller de notre Association, conformément à nos statuts. Nous avons eu la joie de recevoir M. l'Abbé BAUDRY, prêtre du diocèse de Nantes, la proposition que nous sollicitons lors de notre assemblée générale, et nous sommes heureux de lui souhaiter la bienvenue parmi les membres du

.../...

ekkoleriĝema, nekontroliĝema, impulsiĝema homo; ekscitiĝema kiel bolanta lakto, eksplodema kiel pulvo, flamiĝema kiel rezina ligno.

Avoir la chair de poule : havi kvazaŭ anseran haŭton, ektimi, ekfrostiĝi, ekhavi krispiĝantan haŭton; senti venton sub la haŭto, terure tremeti, krispiĝas la haŭto, krepeca iĝas la haŭto.

Jouer au chat et à la souris : serĉesplori pri kaŝitaj detaloj; incite persekuti, plezure senkompate suferigi, priludi iun, kiel kato priludas muson; agi kiel kato ludanta kun muso.

La goutte qui fait déborder le vase : la troa malgrava afero; la guto, kiu elverŝigas, troplenigas, superfluigas la vazen troa guto en plenplena vazo, ekkoleriga vorto; la decide incitiga afereto.

L'habit ne fait pas le mcine : ne konsideru la aspekton; la vesto ne montras, sed kaŝas la homon, ne fidu la eksterajon, ne juĝu laŭ la vesto (la ŝajno); kapuĉo monaĥon ne faras; li estas pli malbona ol li ŝajnas, ne fidu, ne juĝu laŭ la aspekto, bela vestaĵo ne signas belan animon.

Bayer aux corneilles : gapi sencèle, vage rigardi, malatente rigardi; sencèle ekulaĉi.

Le creux des vagues : interendoj, profundaĵo inter la ondoj, interonda sulkego; ondovaleto.

Novaj proponoj : Avoir la priorité, être majeur.

Ni atendas solvoj ankaŭ de la liganinoj !

!!

J e P a s k a e n S t r a s b u r g o .

Jen resume la prezento de la unua franca-germana Esperanto-kongreso, okazinta de vendredo, la 4-a de aprilo 1969 ĝis mardo, la oka, inkluzive. Ĉar ne nur laŭ la dato, sed multe pli laŭ karaktero kaj etoso la religia signifo de la Paska Festo donis sian brilon kaj vivforton al tiu unua kunesto de Esperantistoj el la du landoj.

.../...

.../...

Por akcenti unu trajton, tiel simplan, kaj tamen tiel efikoplenan : la ĉeesto de multaj samideanoj - la listo de kongresanoj nombras eĉ 380 vizitantojn - kiuj tiel diferencas laŭ lingvo, fingrofrape atentigis pri la utileco de Esperanto al ili mem, kaj eĉ necesigis ĝian uzadon !

Tiu konstato kaj tiu sperto estu inspiro por estontaj kunvenoj de Esperantistoj : prefere ili estu almenaŭ inter diversnacionoj. Laŭ mia opinio same la partoprenontoj pli multe ŝatos tion, ĝuste por povi kaj devi uzi nian lingvon.

Rilate la religian aranĝon ame estis grava paŝo antaŭen, kiun ni povas noti ! La antaŭan jaron ni kongresis en Aix-en-Provence kaj ricevis apartan permeson por la celebrazo de la Sankta Meso tute en Esperanto. Ni jam raportis pri tio en "Franca Katolika Esperantisto", N-ro 77 de Julio 1968. Intertempe aperis la ĝenerala decido el Romo, kiu aprobas la uzadon de Esperanto en la tuta Sankta Meso antaŭ ĉiu grupo de partoprenantoj. Jen, kio estis escepta permeso en la pasinta jaro, tio fariĝis jam aprobita regulo en la nuna !


Ni estas feliĉaj, esti inter la unuaj, kiuj ĝuis la favoron de tiu feliĉiga decido rilate nian lingvon. Tiel nia komuna eŭkaristia soleno en la preĝejo se Sankta Stefano kun ĉirkaŭ cent personoj bele sukcesis !

Ne facile ni povas troigi la gravecon de tiu oficiala aprobo rilate la aplikon de Esperanto en nia liturgio. Ĝi ja koncernas la tutan Eklezion. Tion akcentas artikolo kun titolo : "Mondskala apliko de Esperanto" en la revuo "Vojo, Vero, Vivo" de la Internacia Katolika Informejo" (Tilburgo, Nederlando), en la numero de novembro 1968 : "Jen de decido de universala signifo : la Katolika Eklezio kiel la plej granda mondorganizo same estas la unua, kiu tiel pozitive enkondukas la internacian lingvon por sia internacia vivo.

Ek de jarcentoj ĝi jam uzadis la latinan lingvon kiel komunikilon internacian, dum aliaj organizoj kaj landoj ne posedis ion tian ! Ĝia progresemo ebligas jam nun oficialigi la uzadon de Esperanto, kaj ĝi faras tian jam nun koncerne ĉiujn landojn kaj popolojn !"

Fine: bonvolu akcepti mian koran dankon, vi ĉiuj, kiuj kontribuis al ĉi tiu gastema restado.

H.G. Wannemakers S.J.-



KONGRESO I.K.U.E. ROMO 1950
Sur la Ŝtuparo de l' Kapitulo.

La foto, kiu aperis en la n^o de julio 1968 de nia bulteno, montris la lastan katolikan kongreson antaŭmilitan. Jen hodiaŭ la unua postmilita, en kiu partoprenis kelkaj liganoj.

Ni denove petas niajn legantojn alsendi al la redakcio fotojn pri interesaj okazaĵoj. Ni resendos ilin post uzo se vi aldonos afrankitan koverton. Ankaŭ artikoloj estos bonvenaj.

La richesse du
cause : le mouton.



" MI ESTAS LA BONA PAŝTISTO; MI KONAS MIAJN ŜAFOJN KAJ LA
MIAJ MIN KONAS." (Jn 10, 14)

La sacerdoto estas la homo de Dio, la ministro de la Sinjoro;
li agas " in persona Christi."

La sacerdoto estas la homo de la komuneco. Li ne vivas por si,
sed por la aliaj. Ĉiuj homoj atendas la sacerdoton. La mondo bezonas
lin. La Eklezio bezonas lin. Kiu kategorio da homoj ne bezonas la
kristanan predikon, la fidon, la gracon? Kiu homo ne bezonas iun, kiu
sin dediĉas al li kun abnegacio kaj amo? Jes: la misioj, la junularo,
la lernejo, la malsanuloj kaj nuntempe kun pli granda urĝeco la la-
borista mondo konsistas daŭran alvokon al la koro de la sacerdoto.

En si la sacerdoto estas la signo de la amo de Kristo por la
homaro, la atestanto de la plena devontigo per kiu la Eklezio deziras
realigi tiun amon, kiu iras ĝis la kruco. La sacerdoto estas portanto
de Dio: "Tiu trezoron ni portas en argilaj vazoj, por ke oni klare
vidu, ke tiu eksterordinara potenco apartenas al Dio kaj ne venas el
ni." (2 Kor. 4,7)

La sacerdoto estas ano de la universala Eklezio. Ni helpu ĝin
per nia kunlaboro, nia aliĝo, nia pacienco. Ni amu la Eklezion?

Paŭlo VI.

" ĈION, KION VI DEZIRAS, KE LA ALIAJ FARU POR VI,
FARU MEM POR ILI." (Mt 7, 12)

Mi deziras esti respektata, mi volas, ke la aliaj agnosku mian indecon. Mi ribelas, kiam oni traktas min kiel roboton, aŭ kun malŝato, kiel hundon...

La Judoj el la tempo de Jesuo ankaŭ tion deziris. Pro tio ili tute konsentis, kiam Jesuo asertis, ke la ĉiela Patro amas ilin ĉiujn sen ia particeco, ke Li sendas la sunon super la malbonuloj kaj la bonuloj. Ili ankaŭ aprobis liajn vortojn, kiam li diris al ili:
" Ĉion, kion vi deziras, ke la aliaj faru por vi, faru mem por ili."

Sed kiam Jesuo eniras la domon de la publikanoj, kiam li akceptas, ke prostituitino lin parfumu kaj kisu liajn piedojn, kiam li defendas adultulinon, kiun oni volas ŝtonmortigi, kiam li postulas, ke oni allasu la infanetojn, Jesuo mirigas, ŝokas, skandaligas kaj oni malamas lin. Tiam oni diras kaŝe: " Jen amiko de la publikanoj kaj pekuloj."

Vere - tio estas mem evidenta - Jesuo ne aprobis la pekon, sed li opiniis, ke eĉ pekulo, eĉ prostituitino devas esti traktataj kun respektado kaj indeco; li fidis je ili.

Kial do la samtempuloj de Jesuo skandaligis? Pro tio, ke lia sinteno juĝis ilian.

Ofte estas granda distanco inter teorio kaj praktiko.


Estas facile abstrakte diri, ke oni respektas ĉiujn; sed fakte, kio fariĝas el tio?

Kaj nuntempe, ĉu estas tiel mal-simile?

Ĉu vere ĉiu el ni skrupule obeas en ĉiuj cirkonstancoj la Deklaracion de la Homaj Rajtoj kaj antaŭ ĉio la respekton de la alia, de la proksimulo, de la frato en lia homa indeco?

Ni lajale ekzameni nian konscion!

Les volontaires
féminines ont
à la préparer à
son futur rôle.



LA MONTO EBLIGAS AL LA HOMO MALKOVRI SIN MEM KAJ PLI BONE
KOMPRENI LA ALIAJN: EN PLENA VERO.


La monto montras al ni, kiu ni estas. Estas senutile provi trompi. Oni vivas solidarecon, kamaradecon en kiu la bonhavaj kaj sociaj diferencoj malaperas. Ĉiu estas, kio li estas. Kaj la unua en la ŝnurgrupo estas agnoskita de ĉiuj. Multaj aliaj cirkonstancoj povas ebligi al ĉiu sin montri sub sia vera lumo. Kaj oni estas kelkfoje mirigita malkovrante, kion kapablas la homo: tion, kion li portas en si.

Kristo, vera Dio kaj vera homo, malkovras, rivelas al ni, kion ĉiu el ni portas en si: la celon de Dio, la ideon de la Patro pri

la homo. La homo estas kreita por ami, por doni al la aliaj, se necese, eĉ sian vivon. Sed ĉe la fino de tiu vivo, la homo reviviĝos. Ne por dua vivo simila al la unua: por tiu nova vivo, kiun Kristo, unuavice inter ni, ricevis de la Patro. Per sia morto kaj sia releviĝo, Kristo donas al ni konon pri la homo, kiun neniu alia homa sperto povus liveri al ni.

EN KRISTO LIBERE OFERANTE
SIN AL LA MORTO KAJ RELEVIGANTE
AL NOVA VIVO, NI MALKOVRAS LA
VERON DE L' HOMO.

&°&°&



« Quand on a franchi un passage difficile,
c'est comme si on s'était baigné l'esprit. »

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO .

La 8-an de junio okazis ĉe Chabrol la konsilia kunveno de la Ligo. La prezidanto, S-ro Colas, malfermas ĝin je la 15.15

Ĉeestas : F-inoj Le Boëdec, Paulier, S-ino Vincent, Frato Marmou, S-roj Colas kaj Despiney.

Senkulpiĝis : S-roj Bessière, Barrier kaj Ribot.

La protokolo de la ĝenerala kunveno, aperigita sur la aprila bulteno, estas unuanime aprobita.

Post komparo de la projektaj senditaj de S-to Ouarnier, S-roj Frangeul kaj Ribot, la konsilio elektas tiun de S-ro Ribot kun kelkaj modifoj kaj decidas 5.000 ekzemplerojn de tiu informilo.

La prezidanto legas leteron de S-to Baudry, kiu sin proponas por esti nia religia konsilanto. La Propono estas unuanime akceptita kun granda entuziasmo. La prezidanto sendos al li dankleteron kaj aranĝos renkonton por plani estontan kunlaboron.

En Helsinki okazos la unuan fojon interreligia kunveno : ĝin partoprenos verŝajne S-ro Tuinder, prezidanto de IKUE.

Pro la gravaj servoj faritaj al la Ligo, la konsilio unuanime konsentas akcepti S-ton Ouarnier, kiel dumvivan membron.

Por helpi al la verkaĉo de historio de IKUE, F-ino Le Boëdec proponas, ke oni pruntesendu parton de la arĥivoj de S-ro Duffaud al IKUE. Ŝi klopodos viziti S-inon Duffaud.

La Konsilio pridiskutas la eblecon aranĝi kongreson en 1970 en La Houssaye (S-&-M). Jen la provizora programo : je la 9-a, meso en Esperanto; je la 10-a, ĝenerala kunveno; je la 12.30 : komuna tagmanĝo; posttagmeze, ekskurso.

Nia sindonema "kongresa sacerdoto" Wannemakers petis malnovajn numerojn de nia bulteno. Kiu povas helpi lin ?

S-ro Despiney prezentas la movadon F-olarini (v. artikolon)
La kunveno fermiĝas je la 17.15

La venonta kunveno okazos la 28/9/69 je la 15 h. ĉe Chabrol.

=====
N I A M E M B R A R O .

Dumvivaj membroj :	11	novaj membroj :
23) S-to Ouarnier (Aisne)	11	11) S-ro Martin Paul (Cher)
	11	12) S-ro Morin Daniel (Lôiret)
		13) S-to Majorel (Mali)

